Detlev Blanke naskiĝis la 30an de majo 1941 en Neumünster, norda Germanio, kaj plenkreskis en la norda regiono de Germana Demokratia Respubliko. Li abituriendiĝis (1959) en Neukloster (distrikto Rostock), studis en la Universitato de Rostock: en 1959/60 politikan ekonomion kaj en 1960/64 germanan filologion, geografion kaj pedagogion. De 1964 ĝis 1968 li laboris kiel fakinstruisto en siatempa GDR-tipa 10-klasa mezlernejo.

Post kiam en 1965 la Esperanto-movado en GDR estis reoficialigita, kadre de kulturorganizaĵo, Detlev Blanke estis de 1965 ĝis 1968 honorofica prezidanto de la Distrikta Laborrondo Esperanto en Rostock. En la jaro 1968 komenciĝis lia profesia laboro por Esperanto. Li fariĝis estro de la sekcio Esperanto en la ĉefsekretariejo de Kulturligo en Berlino, sekretario de Centra Laborrondo Esperanto kaj redaktoro de *Der Esperantist* (ĝis 1990). En 1981 li elektiĝis sekretario de la tiam fondita Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (= GDREA) kaj ekde decembro 1990 vicprezidanto de tiu organizaĵo. Ekde la jaro 1977 li estas seninterrompe komitatano de UEA (unue C-komitato, ekde 1989 B-komitato) kaj apartenas ekde 1974 al la estraro de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED). Li krome aktivadis en la Internacia Komitato de MEM (redaktis la 25 GDR-eldonojn de *Paco*, entute 21), kaj aktivadis en aliaj komisionoj, komitatoj kaj organizaĵetoj de la movado. Post la drastaj sociaj ŝanĝoj en GDR, kiuj kondukis al ĝia malapero per aliĝo al FRG, malaperis ankaŭ GDREA (pro unuiĝo kun Germana Esperanto-Asocio). Per tio finiĝis lia pli ol 25-jara aktiva periodo de movadaj funkcioj. Sekvos, espereble, periodo de pli intensa faka agado ol la ĝisnuna, kiu tamen ne estis malintensa

En la jaro 1976 li fariĝis 'doktoro de scienca branĉo' (Dr. phil.) pri kompara lingvistiko ĉe Humboldt-Universitato de Berlino per disertacio pri vortfarado de la germana kaj Esperanto. En 1985 li fariĝis en la sama universitato "doktoro de sciencoj" (Dr. sc. phil.) pri "komunikada scienco (interlingvistiko)" kaj tiel oficialigis interlingvistikon en la scienca pejzaĝo de GDR.

En 1977 li estis instrukomisiito pri planlingvoj en la menciita universitato kaj en 1988 nomumita de la Ministro pri altlernejoj kaj faklernejoj "honoraria docento pri interlingvistiko" en Humboldt-Universitato. Li posedas la universitan instruariton *Facultas docendi*. Li verkis ĉirkaŭ 180 sciencajn studojn, eseojn, recenzojn pri interlingvistiko, esperantologio, historio de la laborista Esperanto-movado kaj movadologiaj temoj, de kiuj iuj aperis en sume 10 lingvoj. Krome li publikigis pli ol 1000 ĵurnalismajn kaj sciencopopularigajn artikolojn en germanaj kaj esperantaj revuoj kaj gazetoj (i.a. 520 artikolojn en la Esperanto-serio de la gazeto *Der Morgen*, 1968-1990, sub la pseŭdonimo Peter Levsen).

Ĝis nun siajn ĉefajn verkojn Detlev Blanke konsideras *Plansprache und Nationalsprache* (Berlin/1981, 1982, Akademie de Sciencoj de GDR), *Esperanto und Wissenschaft* (Berlin/1982, 1986, Kulturbund), *Internationale Plansprachen* (Berlin/1985, Akademie-Verlag), *Konversacia Libro Germana-Esperanto* (kun Till Dahlenburg, Leipzig/1990, Verlag Enzyklopädie). Krom tio menciindas tri antologioj *Esperanto: Lingvo-movado instruado* (Berlin/1977), *La internaciaj lingvosciencaj aspektoj* (Berlin/1979), kiuj aperis ĉe Kulturligo kaj *Sociopolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado* (Budapeŝto: HEA/1978, 1986). Kiel lia ĉefa tradukaĵo aperis *La komunista Manifesto* de Karl Marx/Friedrich Engels (Moskvo: Progreso/1991).

En GDR Detlev Blanke iniciatis kaj gvidis de 1979 ĝis 1988 9 germanlingvajn sciencajn kolokvojn pri interlingvistiko por profesiaj lingvistoj (en Ahrenshoop) kaj de 1979 ĝis 1990 8 internaciajn fakseminariojn en Esperanto (en Ahrenshoop kaj Bad Saarow). Dum tiu periodo li prezentis en GDR pli ol 60 sciencajn kaj sciencopopularigajn prelegojn en universitatoj, altlernejoj, kaj antaŭ aliaj akademaj aŭditorioj. Li iniciatis la serion de ĝis nun 14 esperantologiaj konferencoj kadre de la Universalaj Kongresoj (ekde 1978), el kiuj li mem gvidis 10. Prelegvojaĝojn li faris i.a. al Bulgario, Finnlando kaj Francio, kaj krome prelegis antaŭ akademaj

aŭskultantaroj en CSSR, Ĉinio, Japanio, Kubo, Pollando kaj Hungario kaj kadre de la 14a Internacia Kongreso de Lingvistoj en Berlino/1987.

Por la estonteco li projektas librojn pri la historio de la Esperanto-movado en GDR, pri la historio de la germana laborista Esperanto-movado, kaj planas la kompiladon de ampleksa bibliografio de interlingvistiko/esperantologio (kun pli ol 10,000 eroj). En 1991 li elektiĝis prezidanto de nove fondita *Gesellschaft für Interlinguistik* (Societo pri interlingvistiko, GIL).



Dum nia 39a ksf (1-3maj92) d-ro Detlev Blanke prezentos sub la temo 'Lingvoscienco kaj planlingvoj: teoriaj kaj praktikaj aspektoj' 7 unuhorajn prelegojn.

1) La lingvoscienco kaj ĝia sinteno al planlingvoj (aparte E-o). (De la 19a jarcento ĝis la nuntempo: historio de antaŭjuĝoj, miskomprenoj kaj agnoskoj, kialoj ĉe la lingvistoj kaj la planlingvuloj/esperantistoj)

2) Pri interlingvistiko kaj esperantologio: objekto, aktuala situacio, tendencoj kaj problemoj. (Defino de la objekto de la du disciplinoj, ilia rolo en kaj ekster la lingvistika medio, tendencoj ĉe publikaĵoj, esploraktivecoj kaj aranĝoj)

3) Prezento de interlingvistiko, Esperanto kaj Zamenhof en grandaj diverslingvaj enciklopedioj kaj lingvistikaj verkoj. (Kompara analizo de la ĉefaj prezentitaj informoj)

4) Lingvistika valoro de planlingvoj, aparte de Esperanto. (La studado de la planlingva fenomeno donas gravajn impulsojn al diversaj lingvistikaj disciplinoj)

5) Vortfarado en la germana lingvo kaj Esperanto: kompara prezento de kelkaj problemoj. (La lingvistika prezento de la vortfarado de ambaŭ lingvoj aparte bone demonstras la komunikan kapablon kaj elastecon de E-o)

6) Planlingvo kaj terminologio-scienco: interefikoj (Wera Blanke). (La planlingvoj, aparte E-o, donis ĉefajn impulsojn al la evoluo de la terminologio-scienco. La aparta rolo de Eugen Wüster kaj Ernest Drezen Reefiko de la terminologio-scienco al la evoluo de la esperanta terminologio)

7) Lingvistikaj kaj nelingvistikaj kialoj por la relativa sukceso de Esperanto. (Strukturo, lingvopolitika rolo de Zamenhof, aliaj faktoroj)

Eksterprograme, aŭ laŭdezire, aliaj temoj en diskuttrondoj, ekz. 'Konkludoj por la praktika poresperanta agado en lingvistaj medioj, nacie kaj internacie'

Ĉerpita el "DIALOGO"

organo de Sarlanda Esperanto-Ligo


RECENZO: "La aventuroj de Kajĉjo" de Maria KOWNACKA - Traduko de Maria SITNIK
Desegnaĵoj de Pol DENIS - 84 paĝa - Eldonita de "Groupe des Espérantistes Meusiens".

Kajĉjo, la cikoniido, falis de la nesto kaj vundiĝis. Kiam alvenis la tempo migri suden, ĝi ne povis sekvi la cikoniaron. Pro la malsato kaj la frostoj, ĝi devige ŝtelas manĝaĵon en la trogo de la birdkorto kaj, iom post iom, iĝas dombesto, kiaj Murrurulo, la kato kaj Bukedo, la hundo. Sinsekvas amuzaj kaj eĉ instruaj aventuroj el la kamparana vivo, rakontitaj de la cikoniido mem, kiu senĉese revas pri ranoj.

Plaĉa fabelo en pola vilaĝo, kiu alportas kelkajn nomojn iom stranganajn por niaj francaj oreloj: Kacperĉjo, Vauĉjoĉjo, pri kio neniu rajtas riproĉi... sed por kompreni la vorton "sejmo", necesas scii, ke ĝi estas la nomo de la pola Nacia Asembleo (se mi ne eraras!).

La lingvaĵo estas ĝenerale bona sed kelkfoje estas esprimoj, kiuj iom surprizas, kiel "neĝisatende"... kaj mi ne diras, ke ĝi fluas kiel la lingvaĵo de KABE; se ne estas preseraro, eĉ estas malfacile kompreni la frazon... "ĉiuj veturis al la herbejo kaj mi kiom da nur fortoj sekvis ilin" (paĝo 26a) kaj mi ne sukcesis precize kompreni kiel ili tilas la linon, per tiaj trogetoj sur la bastonoj kaj tia ligna maneto (paĝo 30a)... sed fakte temas pri cikonia observo!

Maurice MERGER



★
★
★
★
★

POUR UN ESPERANTISTE
LA "JOURNEE DU LIVRE"
DURE TOUTE L'ANNEE!

LIBRO-SERVO
12, Rue E. d'Orves
F-54490 PIENNES

Kio estas Esperantisto, kiu **nek** aĉetas librojn kaj **nek** legas? Jes, kia esperantisto li estas?

★ Via libro-servo proponas al vi kelkajn novaĵojn

uz-modo :

Simpla mendo-poŝtkarto.
Baldaŭa libropakaĵo
kun interna fakturo via
kaj danko anticipa
pro via pago tuja!

1 = Por lerni

Geraldo Mattos	Aktuala Metodo de Esperanto	49 FF
(nur en esperanto - kun profesoro)		

2 = Por ĵus komencintoj kaj tuj progresontoj

Claude Piron	"La kisa malsano" (romaneto, kiu uzas nur vortojn kompreneblajn dank' al la kunteksto)	38
--------------	--	-----------

3 = Romanoj, rakontoj, noveloj

José Américo de Almeida	"La bagasejo" romano (tradukita el la portugala lingvo de Geraldo Mattos)	45
Jack London	"Norda Odiseado" rakontoj (tradukita el la angla lingvo de Fernando de Diego)	44
Corrado Tavanti	"Tiu toskana septembro" rakonto (tradukita el la hungara lingvo de Istvan Ertl)	58
Guy de Maupassant	"Sinjoro Jokasto... kaj aliaj noveloj" (elfrancigitaj de Daniel Luez)	37
Sara Larbar	"Karuseloj" romano	38
Hindrik Jan Bulthuis	"Inferio" originala sciencfikcia romano	70
Istvan Nemere	"La blanka birdo" romano (romano de la jaro 1983 - 2a eldono)	45
Ulrich Matthias	"Fajron mi sentas interne" originala romano	47

4 = Belliteraturo kulturiga

La Rochefoucauld	"Maksimoj" (tradukita de G. Waringhien)	43
William Auld	"Kulturo kaj internacia lingvo" eseoj	62

5 = Poezio

Marketa Prochazkova	"Sur la sojlo de la amo" (elĉekigita de Jiri Korinek)	31
Gerrit Berveling	"Tri 'stas tro" originala poemciklo	20
William Auld	"Omaĝoj" (plejparte elangligita)	44

→ Memevidente nian libro-standon vi vizitos dum la **33a E^o-staĝo** en VILLERS-lès-NANCY. Proponiĝos al vi ampleksa, multfaceta panoramo de freŝeldonitaj verkaĵoj. Vi ankaŭ malkovros diskojn, kasedojn, propagandilojn diversajn, ktp.

NICE

CAPITALE DE LA CÔTE D'AZUR

Le soleil toute l'année, une mer transparente, la montagne toute proche... Venez goûter Nice, chef-d'œuvre de la nature. Éblouissants palais, ruelles pittoresques, immenses jardins fleuris, marchés colorés, boutiques par milliers... Venez admirer Nice, premier prix d'harmonie.

Carnaval, les frissons du Casino, le parc d'attractions le plus dingue du monde... Venez vous divertir à Nice, star de toutes les fêtes.

Plaisir unique au monde de skier en poudreuse et régater en planche à voile dans la même journée... Venez bouger à Nice, championne de la forme toutes catégories.

Un Opéra, un Palais des Arts, du Tourisme et des Congrès, un théâtre, des musées, des galeries, des cinémas... Venez vibrer à Nice, grande amie des Arts.

Du Palace Belle Époque à l'auberge familiale, et du rendez-vous gastronomique international au petit "bistrot" traditionnel... Venez savourer Nice, reine de l'hospitalité.

En toutes saisons, venez rencontrer Nice, capitale de l'infini Pays d'Azur.



ĈU ESPERANTO-DOMO

en NICO

ĈEFURBO DE LA LAZURA MARBORDO



"NICO... Suno dum la tuta jaro, maro transvidebla, montaro tute proksima... Venu kaj ŝrandu **NICON**,... ĉefverkon de la naturo! Imponegaj palacoj, pitoreskaj stratetoj, vastaj florumitaj parkoj, buntaj plenaeraj vendejoj, mi-
loj da butikoj... Venu kaj admiru **NICON**, unuan "Harmoni-Premion"!...

Karnavalo, korvibroj dum la ludoj en la Kazino! Amuzejoj plej ŝprenezaj!... Venu kaj distriĝu en **NICO**, stelulino de ĉiuj festoj!

Senkompara ĝuado dum skiado sur polva neĝo kaj dum velbretglitado surmara samtage! Venu kaj "moviĝu" en **NICO**, ĉiugrada ĉampionino de l' bonŝarto!

Operejo, Palaco de l' Artoj, de l' Turismo kaj de la Kongresoj, Teatrejo, muzeoj, artgalerioj, kinejoj...

Venu kaj emociĝu en **NICO**, granda amikino de l' Artoj! De la Palaco de l' "Bela Epoko" ĝis la familia restoracio, de la gastronomia rendevuejo ĝis la tradicia "trinkejo", venu kaj ŝrandu **NICON**, Reĝinon de l' gastigemo!

Iu ajn estu la sezono, venu kaj konatiĝu kun **NICO**... Ĉefurbo de l' senlima Lazur-Lando!..."

☆☆☆

NICO-ESPERANTO (N.E°) intencas krei **ESPERANTO-DOMON** en **NICO** kun 2 aŭ 3 ĉambroj, eĉ pli se eblos. Tiucele **N.E°** proponas al la esperantistaro aĉeti kuponojn po 100 FF por unu. Minimume 3000 kuponoj necesas.

➔ **NUN, NENIU SENDAS MONON!**

Nur li/ŝi devontigas aĉeti N kuponojn, kiam **Nico-Esperanto** estos certa, ke minimume 3000 kuponoj estas aĉetotaj. Tiam, iom post iom, la ricevitan monon ni deponos en **SPECIALAN KONTON** kaj ni klopodos plej baldaŭ aĉeti la **ESPERANTO-DOMON**, tuj kiam la necesan nomon ni estos ricevintaj.

➔ **TIUN MONON VI NUR PRUNTEDONOS!**

Iu ĉambro estos rezervita kiel kunvenejo, ne nur por **N.E°** sed ankaŭ por ekspozicioj, staĝoj... La alia(j) ĉambro(j) estos por gastoj, kiuj restados en **NICO**, je kosto multe malpli alta ol en hotelo. La ĉambro(j) estos komforta kun duŝo aŭ bano, necesajo kaj eta kuirejo.

➔ **KIUJ JAM AĈETIS KUPONOJN, TIUJ PAGOS...**

sian restadon per aĉetitaj kuponoj. Unu kupono pagos unu nokton en du-lita kaj dupersona ĉambro, sen matenmanĝo, sed ĉiu havos eblecon pretigi sian matenmanĝon en la kuirejeto.

La prezo por unu nokto estos la sama -100 FF- por unu aŭ du personoj kaj fikspreze por kiuj, posedas kuponojn. Kiuj ne jam aĉetis aŭ jam uzis la aĉetitajn, tiuj pagos pli, se pliiĝo de la vivtenaj kostoj. La kuponoj ne produktas procenton. La ĉambro devas esti rezervita antaŭ la alveno en Nico.

Ankaŭ ĉiu rajtos uzi la aĉetitajn kuponojn por pagi restadon al iu esperantista amiko, sed nur esperanto-lingvano.

Bonvolu konigi tiun projekton al via **E°-klubo** kaj al ĉiu konato.

.../...

Antaŭ ol sendi monon, ĉiu ricevos pli detalan informon pri la elektita **ESPERANTO-DOMO**. Certe ĝi ne staros sur "Promenejo de la Angloj", tamen la respondeculoj de la projekto prefere rezignus ĝin, ol krei ne komfortan **Esperanto-Domon**. Ni esperas ankaŭ aranĝi simplan tranoktejon, por ke gejunuloj restadu en **NICO** je tre malalta kosto.

Ankaŭ ni akceptas plej etan donacon de tiuj, kiuj ne volas aĉeti kuponon. Sed nun, **ne sendu monon, nur la "sindevontigilon"**. Vi ricevos informon, kiam ni **estos certaj** kolekti sufiĉan monon por aĉeti la **DOMON**.


NICE-ESPERANTO

"Les Hortensias 2", 121 bis, Boulevard Napoléon III,



F-06200 NICE

93 83 08 73 = Poŝtkonto: MARSEILLE 1107-93 S



= SINDEVONTIGILO =

(Ĉu Esperanto-Domo en NICO ?)

S-ro S-rino F-ino

Adreso

Poŝtkodo Urbo Lando

sin devontigas aĉeti (liter- kaj cifereciza nombro)

..... **Kuponojn po CENT (100) francaj frankoj (FF) por UNU.**

Promesas sendi la sumon (je francaj frankoj)

100 FF x ---- = (liter- kaj ciferecize!).

Sendos tiun sumon al **NICE-ESPERANTO** por ebligi la aĉeton de **ESPERANTO-DOMO** en **NICO**, en kiu estos unu aŭ pluraj ĉambroj, kie li/ŝi povos restadi, pagante la restadon per la **aĉetvaloro** de tiuj kuponoj: **UNU KUPONO** por **UNU NOKTO** en dulita kaj dupersona ĉambro, do **100 frankoj (FF)** por **du** personoj aŭ **unu** persono, sen matenmanĝo, sed kun la ebleco pretigi sian matenmanĝon en la kuirejeto.

Kiuj ne deziras restadi en la **NICA ESPERANTO-DOMO** sed tamen deziras helpi al la aĉetado de tiu domo, tiuj povas fari iun ajn mondonacon, kiun li nun **nur sciigas** ĉi-sube, kaj sendos, kiam li/ŝi ricevos la peton.

Li/ŝi ne deziras restadi en la **E°-Domo** sed promesas donaci por la aĉetado la sumon je **(FF)**

Li/ŝi sendos tiun sumon, nur kiam **NICO-ESPERANTO** povos aĉeti la **E°-Domon**. Tiuj kuponoj ne produktas procenton.

La restado povas okazi en unu aŭ pluraj fojoj.

DATO:

SUBSKRIBO:

ATENTON !!! LASTA NUMERO !!!

Jes, se vi ne pagos vian abonon por La Informilo, ĉi-tiu numero 77 estas la lasta sendita al vi.

Kiel scii, ĉu vi jam pagis vian abonon?? Tio estas tre facila: Sur la adres-etikedo de via Informilo, la unua linio konsistas el la adreso-kodo kaj poste la abono-jaro. Se tiu abono-jaro estas 92, tiam vi estas jam paginta vian abonon por 1992. Gratulojn! Post la abono-jaro troviĝas mencioj pri viaj pagoj por la koncerna jaro, A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE UEA ktp

Se la abono-jaro estas 91, tiam aperas poste la mesaĝo Lasta Numero !!, tio signifas, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon por 1992. Bonvolu tion fari senprokraste, se ne, vi donos al nia kasisto la malagrablan taskon, sendi al vi en majo aŭ junio alvok-leteron, kiun vi verŝajne ne ŝatus ricevi, kaj kies afranko estas plia elspezo por la Federacio. Krome vi riskas ne regule ricevi La Informilon.

Abono al La Informilo por enlandaj adresoj	45 FF
Abono al La Informilo por eksterlando	15 Rpk aŭ 57 FF
Federacia kotizo	25 FF
Bankkostoj, se vi pagas per bankĉeko el eksterlando	20 FF

Vi povas pagi:

Al nia poŝtĉekkonto:
FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'ESPÉRANTO 1997 72W NANCY

Aŭ al nia kasisto:
S-ro André GROSSMANN,
5, rue des Pyrénées,
68390 BALDERSHEIM.

Vi atentu, ke via kotizo pagita al UFE neniam entenas la abonon al La Informilo. Sed vi iĝas aŭtomate membro de nia federacio, kondiĉe ke vi loĝas sur la federacia teritorio (departementoj 54 55 57 67 68 88) aŭ en apudaj landlimaj regionoj. Se via adreso estas ekster tiuj regionoj, bonvolu aparte pagi vian federacian kotizon je 25 FF por iĝi aŭ resti federacia membro.

Aparte mi dankas al la abono-pagintoj, kiuj samtempe sendis al mi siajn afablajn bondezirojn por la nova jaro. Al ili mi reciproke deziras plej feliĉan nova jaron, kun prospera partopreno en la diversaj Esperanto-aranĝoj.

A. Grossmann

NIAJ LEGANTOJ RAKONTAS... =====

Legendo de la "infer-truo"

Foje, Francis la violonskrupulo, promenis laŭ valetoj, kie fluas la roĝo "Barba". Tepidis la aero, lirladis "Barba" surŝtone. Subite, li ekvidis alvenantan strangulon, rufharan kaj hirtbarban. La viro alproksimiĝis kaj diris:

"Ĉu vi estas Francis, la skrapulo?"

- *Jes! Al kiu mi havas la honoron paroli?...*

- *Bone! Mi serĉis vin... Mi estas la princo de ĉi-tie. Ĉi-vespere mi donas maskobalon miakastele. Venu animi ĝin per via violono..."*

Ĉar Francis hezitis respondi, konfuzata de lia stranga rigardo, la alia insistis:

"Venu do!.. kaj elpoŝigante arĝentajn monerojn, li aldonis: "Ĝen via salajro!"
Kaj same kiel li venis... li malaperis!

Francis rapide hejmeniris kaj pribabilis tiun renkonton al siaj gepatroj. La patro, jam aĝa, respondis:

"Nek kastelon, nek alian loĝejon mi konas regione; tiu viro povus esti la diablo! Iru do peti konsilon de la paroĥestro..."

La pastro atente aŭskultis la rakonton de Francis, kaj diris:

"Vi ricevis monon por tiu vespero, do, tien iru! Dume, mi preĝos. Kiam vi estos ludinta laŭ la ricevita sumo, vi kantos "Veni Creator". Se li estas diablo, li luĝos!"

Vespere, Francis ekvojis kun sia violono, sed li sin demandis kiel li trovos tiun kastelon, ĉar, tiam konfuzita, li petis neniun klarigon de la viro. Longtempe li marŝadis laŭ la malseka kaj muska vojeto. Subite, ĉe kurbiĝo, aperis grandioza, lumplena kastelo. Homoj en paradaj tualetoj kaj maskitaj ridis kaj interbabilis.

La kastelmastro iris renkonte al Francis, enirigis lin kaj instalas lin sur podion. Plenplena de homamaso estis la dancejo! Travestiitaj, ĉiuj kaŝis sian vizaĝon permaske. Tamen, inter ili, Francis rekonis loĝantojn el ĉirkaŭaĵoj: **Le Beillard** (Le Bejar), **Rain-Brice** (Ren-Bris), **Rehaupal** (Reopal)... jam delonge mortintajn.

Nia ludisto, tutkore muzikadis. Silente, sur la vaksita pargeto, glitis kaj svingis la danĉparoj.

Post longa tempo, Francis tediĝis. Pro la ricevita salajro, laca, kaj ludinte sufiĉe siaopinie, li deziris ĉesi. Sed, subite, la arĉo ne povis malproksimiĝi sin de la violonkordoj... Plej kaj plej rapide, malgraŭ sia volo, li ekludis misharmoniajn ariojn... Satanmaniere kirliĝis la paroj!

Helpvokante la Eternulon, la junulo, per laŭtega voĉo, ekkantis la "**Veni Creatoro-n!**"

Tiumomente okazis timeginda eksplodo! Planken estas ĵetitaj la dancistoj... Ili tordiĝis kaj kriis terure! De ĉiuj kastelanguloj altiĝis akra fumo...

Ŝajnis al Francis, ke tiu tempo daŭris kiel eterneco!...

Post kiam disiĝis la fumo kaj revenis la kvieto, nia tute tremanta violon-skrapulo sin retrovis... sidanta sur arbostumpo, funde de beleta profunda valo, kies nuntempa nomo estas "**La Infertruo**".

Denise DIDIER

kaj la vogeza esperanto-grupo

(vegetaranoj rezignu pri lego de tiu anekdoto...)

Du kanibaloj, la patro kaj la filo, embuskas rande de arbaro en Afriko.

Alveturas moderna aŭtobuso, kiu haltas apude. La turistoj, verŝajne ĉiuj el Eŭropo, malsupreniras, ĝoje ridas, preparas siajn fotilojn kaj video-kamerojn... Inter ili, multaj junaj virinoj, tre simple vestitaj pro alta temperaturo.

La juna kanibalo okulumas al iu blondulino kun alloga silueto...

"Paĉjo, ni kaptu ŝin... kaj ni manĝu ŝin!..."

- Jes, filo mia, ŝin ni tuj kaptos... sed vian patrinon ni manĝos!"

lastminute: Grava novenkondukaĵo en la Internacian Laborokodon

(Ni opinias, ke tiu informo povos helpi al multaj por-esperanto-laboristoj, kiuj sindoneme kaj senĉese klopodas por progresigi nian aferon kaj malesperas iam ĝui etan ripozon...)

=== PLENSKRIBENDA FORMULARO POR PETI MALSANIĜON ===

Ĉi-tiun formularon vi sendu al la taŭga ofico minimume **21 tagojn** antaŭ la dato je kiu vi deziras ekmalsaniĝi.

NOMO: ----- SEKSO: -----

LABORFAKO: ----- FUNKCIO: -----

PRECIZA DIFINO DE LA PETATA MALSANO:

DATO JE KIU VI DEZIRAS EKMALSANIĜI:

(La petojn rilatantaj al gravediĝo vi sendu **2 monatojn** antaŭ la planita ekgravediĝo. Vi nepre aldonu la specifan formularon N° **WS. 36/24/98.**)

KONSENTO DE LA KUNULO: jes ne

ĈU VI JAM PETIS SUFERI TIUN MALSANON?:
jes ne

SE JES, JE KIU DATO?: -----

KIUN MALSANOGRADON VI DEZIRAS?:
negrava **grava** **invalidiga** **pereiga**

SE VI ELEKTOS LA **INVALIDIGAN**, ĈU VI DEZIRAS, KE LA **INVALIDECO** ESTU DEFINITIVA?:
jes ne

(La petantoj de la "**pereiga**" bonvolu sciigi, ĉu ili deziras, ke reprezentanto de la ĉef-aro ĉeestu la funebran ceremonion)

KIE VI DEZIRAS ĈUI VIAN MALSANON?:
hejme en malsanulejo sur la **Lazura Marbordo** sur **Karaiba Insulo**

ĈU VI DEZIRAS ELEKTI **KONTAĜAN** MALSANON?
jes ne

SE JES, SCIIGU KIOM DA PERSONOJ VI DEZIRAS KONTAĜI: -----

ĈU ONI JAM RIFUZIS AL VI PETON JE MALSANIĜO?: jes ne


SE JES, DONU LA TAŬGAJN INFORMOJN:

ĈU VI DEZIRAS, KE VIA KUNUL(IN)O ESTU INFORMITA PRI VIA MALSANIĜO?:
jes ne

"Mi honoratestas la ĝustecon de la ĉi-supraj informoj"

SUBSKRIBO: ----- DATO: -----

(La petantoj estu avertataj, ke la peton pri malsaniĝo oni konsentos nur laŭ la merito de la demandanto, kaj ke pli ol 3 sinsekvaj petoj dum unu jaro estos taksataj kiel superrajtaj kaj ne konformaj al la ĝenerala bono de la socio. Petantoj de pereiga malsano nenikaze povos profiti ĝin pli ol unufoje dum la jaro.)



...Jes! Temis pri la kontribuado de "LA INFORMILO" al la "fiŝoŝerco" de la 1a de aprilo!





EL NIA LETERKESTO...

Jean Codjo, korespond-amiko de nia samideano André Grossmann, raportas per letere pri kelkaj kutimoj religiaj en sia afrika lando, Respubliko **BENINO**. Post la multifaceta bildaro pri la vivo en Japanio, kiu aperis en "La Informilo" sub la plumo de Tsukuru Harada, jen kelkaj aspektoj de la ĉiutaga vivo en malproksima Mezafriko.

"...Kiel mi jam diris je la komenco de mia letero, mi volas al vi paroli pri kelkaj kutimoj.

Ekzistas en Afriko multaj dioj, je kiuj oni kredas. La politeismo estas pli praktikata, malgraŭ la invado de eŭropaj aŭ aziaj religioj. La fetišismo estas la plej konata kaj praktikata de preskaŭ ĉiuj Afrikanoj, krome nur kelkaj, influataj de eŭropaj edukadoj aŭ pensmanieroj. Tamen kelkaj Afrikanoj ne scias kion ŝari... Ili staras inter la fetišismo kaj la importataj religioj, precipe inter la kristanismo kaj la fetišismo. Ili kredas jen je kristanismo, jen je animismo.

Koncerne la islamanojn, ili kredas pli aŭ malpli je Alaho. Ĉiu-okaze ili estas pli monoteistoj ol la aliaj Afrikanoj. Aliparte oni konstatas nun, ke multaj Afrikanoj interesigas plie al kristanismo kaj islamismo... La vilaĝanoj klinike, la vilaĝanoj kliniĝas plie je animismo ol je la importataj religioj... Ili kredas je multaj dioj, ekz. giganta arbo, ĝemeloj, tero, ktp. La pens- kaj ŝarmaniero diferencigas de iu regiono al alia. La maniero, laŭ kiu ĉiu Afrikano praktikas la animismon ne estas ĉie simila. Ekzemple, norde de mia lando, **Benino**, precipe en Atakora, ili mortigas ĉiujn ĵusnaskitajn infanojn, kiuj aspektas nenormalaj; la infano, kiu naskiĝas kun ses fingroj anstataŭ kvin ne rajtas vivi. Male, preskaŭ en la tuta suda parto, tiuj "eksternormaj" infanoj estas konsiderataj kiel dioj... Jam dum la akuzo, ili iĝas dio sub la nomo de "Tohosu". Tiu dio simbolas posedandon de mono. Sekve, la virino, kiu naskas tian infanon riĉiĝas! La gepatroj ŝaras ĉion por pleje zorgi pri sia ido... kaj kelkfoje mal-riĉiĝas pro tio!

Ĝemeloj estas ankaŭ dioj en Afriko. Sude de Benino, oni kredas vigle je tiu dio nome "Hoho". La gepatroj de tiuj infanoj estas ĉie respektataj de ĉiuj; kelkfoje la ĝemeloj estas bele vestitaj de sia patrino, kiu ilin promenadigas tra urbo kaj bazaro, kolektante monon aŭ donacon. La patrino estas gratulata pro la naskeco de tiuj dioj! "Hoho" estas ankaŭ konsiderata kiel dio de mono. Kiam unu el la ĝemeloj mortas, oni neniam diras, ke li mortis sed li estas en la arbaro, serĉante ŝarbo-lignaĵon. La restanta frato ne devas pensi, ke lia frato mortis! Sekve oni reprezentas la forpasinton per iu statuoj, kiu ĉiam troviĝas kun la vivanto. Li translokiĝas je ajn kun sia statuoj-frato...

Fero estas ankaŭ dio sub la nomo de "Gu". La mekanikistoj, la ŝoforoj, la lignajistoj, ktp. asertas, ke ili estas anoj de "Gu", ĉar la iloj per kiuj ili laboras estas ellaboritaj el ŝero. Kiam unu el tiuj laboristoj mortas, oni diras, ke "Gu" respondecas pri tiu malleliĉaĵo. Eble la mekanikisto ne ŝaris oferon al la dio. Pro tio, ĉiu ŝer-laboristo ofertas ĉiujare ŝaĵojn, kokojn, bovojn... al "Gu"! Tiucele oni kunigas ĉiujn ilojn en iun grandan skatolon kaj tranĉas la gorgon de la besto, dum oni sangumigas la ilojn... Post tiu evento la ŝer-laboristo neniam forpasos pro akcidento laŭ la kutimo.

Multaj Afrikanoj havas fidon je tiu ŝarmaniero, eĉ se ili estas influataj de eŭropaj civilizacioj. Tamen, kelkaj tute ne. Tiuj ĉi havas malfacilaĵojn por loĝi en siaj propraj vilaĝoj. Ĉiunmaniere, religia problemoj en Afriko estas komplika kaj delikata."

Jean Codjo

Nota de la redaktoro: ni taksas oportune aldoni al niaj legantoj kelkajn informojn, kiuj ankaŭ kuŝas en tiu letero: "...Mi tutsimple volas diri, ke mi ja konsentus korespondi kun Poloj, Hungaroj, ktp... sed mia sola problemoj temas pri mono necesa por afranki leterojn. Mi havas grandan malfacilaĵon eĉ por sendi leteron al vi! Francio estas la sola eŭropa lando, al kiu oni povas skribi "ne multekoste": 190 FCFA... Por afranki leteron al la menciitaj landoj mi devus pagi... 3000 FCFA!..."

Saman situacion frontas niaj samideanoj el "orienta Eŭropo"... Ĉar preskaŭ ĉiuj landoj (eĉ en Afriko) estas membroj de la Universala Poŝta Unio, ni konsilas al niaj legantoj ŝovi **aŭtomate** unu aŭ plurajn "IRKojn" (Coupons-Réponses Internationaux), haveblaj en ĉiuj poŝtofficjoj, en ĉiun leteron sendotan al tiuj landoj. Vi **grandskale** helpas viajn korespondantojn!

"la poignée d'irréductibles" dans notre esprit, n'avait rien de péjoratif. L'histoire du monde regorge heureusement d'exemples de ces "irréductibles" grâce auxquels les causes que l'on croyait perdues ont pu triompher.

Longue vie, donc, à l'Espéranto !

Sincèrement vôtre,

Corinne THERMES
Service Magazine

à propos
de l'exploit
de Lucien
Pénaire...

**Femme
Actuelle**

et en
réponse à
une "rebat-letero":



? u distra angelo



KRUCVORT-ENIGMO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

HORIZONTALE

1 mezepokaj lirikaj poetoj - sufikso. 2 mola enbuŝa apendico - aperigi sekretaĵon (adverbo). 3 Pariza fortreso - moskeoteologo(r). 4 vaporamaso - honora societo. 5 diferenco inter proksimuma kaj ekzakta valoro(r) - pagilo(fonet.) - estigi sonon(r). 6 longkranio. 7 konjunkcio - malpia reĝino de Judujo - ĉefurbo de la minoa Kreto(r). 8 nekorektaĵo sintaksa - plezurkunveno(r). 9 mamulo el la subordo de fokuloj(r) - haŭtomakulo pro kontuzo. 10 mallarĝa kaj malprofunda rivereto - senpartiaj juĝoj pri diversaj artoj. 11 kolora likvaĵo por skribi(r) - tolpeco - monosakarido - rigardi kiel verdireman, ne postulante

pruvojn(r). 12 idealaj modeloj - puno per kolektiva sistema rifuzo de komercaj rilatoj.

VERTIKALE

1 bongusta bovaĵfileo - ceremonituto(r). 2 birdo el familio de turtedoj - pura muzika sono(r). 3 rilatanta al organa korpo de birdoj - trikorda triangula gitaro(r). 4 veturilo(r) - birdo el familio de aŭkedoj(r) - seksa impulso ĉe homo. 5 vertikale granda(r) - ricevita objekto post hazarda konsulto (fonet.) - indianaj tribestroj. 6 Konjunkcio - nedifina pronomo - franca komediverkisto. 7 artefarita substanco analoga al nilono(r) - unua prova strekado de desegnaĵoj. 8 en brazila urbano - subjunkcio - tradiciaj rakontoj pri dioj. 9 virnomo - ridiga, amuza(r) - loĝanto de la sudokcidenta Araba insulo(r) - farbopigmento. 11 germana lancisto - verda insulo en dezerto - sufikso. 12 kapablo konservi perceptojn - metia, eduka manlaboro.

SILAB-ENIGMO

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj vorteroj, malkovru vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj vertikale legataj elformas proverbon.
 an ar ci ci di el el en eo eo es gio iĝo ip is ka ku le li lo lo lo lo lo ma mo mo mo na neŭ nio nor od of opa re sa so ta te to tra up

1	+ - - + - -	teksanta artikulo
2	+ - - + - - - -	ero de kemia korpo
3	+ - - + - -	malrespekti senton
4	+ - - + - - - -	unu el la muzoj
5	+ - - + - -	universitata sveda urbo
6	+ - - + - - - -	kutima, meza nivelo
7	+ - - + - - - - - -	operaro de Wagner
8	+ - - + - - - -	respubliko de eks-Sovet.
9	+ - - + - -	muziksigno
10	+ - - + - -	fermita koniko
11	+ - - + - - - -	koncerto de solisto
12	+ - - + - -	virnomo
13	+ - - + - -	punĉ-aromaĵo
14	+ - - + - -	reĝo de Itako

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27		
1	A	T	R	I	B	U	I	L	A	B	O	R	A	T	O	R	I	O	T	A	L	E	N	T	O				
2	K	R	I	O	L	D	A	G	E	N	E	R	A	T	O	R	J	U	L	O	A	R	T						
3	C	E	P	O	E	S	T	I	J	N	I	L	A	R	A	Z	I	O											
4	E	O	F	R	O	K	F	E	N	I	K	S	O	R	O	B	O	O	M										
5	L	A	K	I	E	O	M	A	N	O	M	E	T	R	O	O	U	Z	I	F	A								
6	O	N	I	A	T	A	N	G	A	K	O	N	E	N															
7	J	O	D	O	L	U	N	A	F	A	N	T	A	Z	I	O	S	O	D	O									
8	D	O	M	O	K	A	R	O	T	O	L	E	N	O	R	M	A	M	O	K	E								
9	R	O	M	V	K	I	T	R	I	M	D	A	R	O															
10	O	L	E	O	M	K	S	P	A	N	G	E	O	R	A	N													
11	E	N	I	S	K	E	Ĉ	E	K	O	N	T	R	A	S	T	O	S	P	I	C								
12	S	P	O	T	A	N	I	M	I	Z	O	B	A	R	O	J	A	N	I	K									
13	P	O	I	S	O	N	A	M	A	J	P	T	O	L															
14	O	R	L	U	I	K	E	K	S	T	R	A	K	T	O	E	T	R	O	J	O								
15	R	V	N	U	K	O	P	A	R	E	N	C	O	B	R	U	O	G	P										
16	A	B	I	O	A	L	E	O	A	A	M	I	R	E	T	U	K	O											
17	D	E	V	N	A	S	O	T	R	I	M	E	S	T	R	O	O	M	L	U	R	O							
18	A	R	A	B	E	S	K	D	R	A	K	O	C	E	F	A	L	O	I	N	S	E	K	T	O				

====Finjara konkurso====
 solvo de la krucvort-enigmo

solvo de la silab-enigmo: "Kiu kaptas tro vaste, konservas malmulte".
 (spite al "ŝercpetolaj koboldoj" kiuj ŝoviĝis en la difinaron de nia krucvort-enigmo -kaj sekve kapdolorigis la cerbumintojn!- 9 el ĉi-lastaj sendis sian solvon. Gratulon al la 3 gebonŝanculoj, kiuj plej fulme sendis sian kradon kaj ricevis libron:
 Ginette MARTIN, André BLANCHET, Jacques ROUX